

LA VERDA LUPEO
FENĪKSO



Nr-o 72 **1987/2 Julio** **18a jaro**


Informilo de Esperanto Ligo Filatelista
– Faka asocio en UEA –













Informilo de ELF-AREK (Faka asocio en UEA)
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidanto/Kasisto:	Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna
Stampobanko:	Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau
UEA-konto:	elfx/r
Poŝtkonto:	51 57 85-4, I. Paulsson, Solna, Svedujo
Kotizo por 1987:	15 poŝtaj respondkuponoj, nur maldekstre stampitaj estas validaj. Aú egalvaloro: 50 svedaj kronoj, 15.– gmk. Aú per novaj poŝtaj E-stampoj, post antaúa interkonsento kun nia stampobank-estro.

Nun ni estas meze

en nia Jubilea Jaro. Hieraú mi revenis el dusemajna ferio, kiun mi pasigis en la nordo de mia lando apud bela lago. Sukcese mi praktikis tie angilo-hokadon. Hodiaú, la 15an de junio, mi finredaktas tiun ĉi informilon. Bone, ke mi iomete atendis la pretigon, ĉar atingis min kelkaj por ni gravaj sciigoj. Ekz. pri KU 1, ĈIN 5, eĉ pri la GDR-pm. La manuskripto fariĝis tiom ampleksa, ke la tutan glumarkan parton, kiu ĉi-foje jam estas tre ampleksa, ni povas aperigi nur en la sekvonta numero. Pro tio ni pardonpetas. Koran dankon mi direktas al ĉiuj niaj klubaj geamikoj, kiuj kunhelpis en la redaktado de tiu ĉi informilo per alsendo de materialoj k informoj. Eble ni renkontiĝos en nia jubilea kongreso dum nia ELF-AREK-kunveno. Eble vi havos tie eĉ eblecon, vidi grandan filatelan E-ekspozicion kun 300 folioj, kiun mi pretigis. Sed tio estas necerta pro kelkaj malfecilaĵoj. Mi pretigis ankaú novan suplementon por nia stampokatalogo kaj esperas, ke denove eblas aperigi ĝin sur aparta folio.

Sincere salutas via redaktoro
R. Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Karl-Marx-Stadt, DDR 9047 (Germana DR)

Radiostacio ELF/AREK

ne ekzistas, sed ĉiun duan semajnon vi povas aúskulti esperanto-filatelan angulon en la radioprogramo de Radio Polonia.

Sabate:	16.30 kaj 19.30 h
Dimanĉe:	15.30 kaj 21.30 h
Lunde:	5.30 h

La Esperatno-redakcio de Radio Polonia en la kadro de ĝia programero ESPERANTO EKSPRESO jam plurfoje en tiu ĉi jaro informis anbunde pri novaj E-filatelaĵoj, pri nia klubo ELF/AREK kaj pri filatelaj Esperanto-ekspozicioj. Eĉ oni elsendis intervjuojn kun via redaktoro de La Verda Lupeo . . . Se vi do deziras aktualajn informojn pri nia fako, tiam klopodu aúskulti tiun radio-stacion. Skribu men al RADIO POLONIA/Esperanto redakcio, 00-950 Warszawa, Box 46, Pollando, kaj petu la programon.

Adresŝanĝo
V. Hernandez Llusera, Onze de Setembre 59, E-08208 Sabadell

Anonco
Sendi 25 div. glm, mi rekompencos per 50.
Vilmos Radnai, Box 40, H-2331 Dunaharaszti

Bonvenon!

Geoffrey Wood, 37 Thornes Moor Close, Wakefield, West Yorkshire WF2 8 QA, Britujo
Frans Stein, Leliestraat 20.c. NL-3071 VG Rotterdam
Modesto Ramelli, 11 Impasse Moulin Neuf, Chatel St Germain, F-57160 Moulin les Metz
Robert Lefebre, Str. Cesar Willefort 1, F-62110 Henin-Beaumont
Geoffrey D. Hammerton, 8 Bonsall Drive, Kickleover, Derby GB-DE3 5HQ Britujo
Elda Dörfler, Via del Bosco 24, I-34131 Trieste
Mia Maatman, M.K. Hofstedestraat 44, NL-1972 RX Ijmuiden
Rolf Jalming, Björnlandavägen 225, S-417 29 Göteborg
Ziro Suzuoki, 14-1, Okamoto 7, Higashinada, Kobe, J-653

Neatenditaj surinamaj E-pm

Nek Kubo, pri kies E-pm ni eksciis plej frue, nek Bulgario estis la unua lando, kiu emisiis jubile-jarajn Esperanto-poŝtmarkojn. Estis Surinamo, verŝajne pro la rekomendo en la lasta UNESCO-rezolucio. Verdire: mi supozis tiun landon ie en Oceanio, sed mi trovis ĝin nordokcidente de Brazilo. Kaj mi eksciis, ke tie vivas sur areo de 136 000 km² (tio estas areo egala al 1,5 x GDR-teritorio) 383 000 homoj. Sed, ĉu tie ankaú vivas iu esperantisto, tion mi ne sukcesis ekscii. Tamen, simpatiantojn nia movado tie devas havi, aú iujn komercistojn, kiuj esperas profitojn el tiu eldono. Egale! Ni ĝojas, ke en Surinamo oni eldonis Esperanto-poŝtmarkojn kaj mirigas la fakto, ke la grafikisto bone konas nian movadon.

Dank'al nia estimata kaj kara kluba amikino Anni Wester, kiu kiel unua malkovris tiun eldonon, hodiaú eblas prezenti al vi tiun belan serion:

60 cendoj: Sur la poŝtmarko aperas verda kvinpinta stelo antaú flava fono kun la vortoj 100 JAAR ESPERANTO. Sube sur ruĝa fono: SURINAMO 60 c.

110 cendoj: Blua mapo pri la tero kun verdaj kontinentoj. Antaú tio du packolombetoj tenas ruĝan rubandon kun la surskribo ESPERANTO. Sube sur flava fono: SURINAME 110 c.

120 cendoj: Portreto pri Zamenhof, maldekstraflanke: teksto L.L. Zamenhof 1859–1917, sube dekstre: jubilea simbolo kaj la vorto ESPERANTO, supre dekstre: SURINAME 120 c.

Iu okcidentgermana filatela gazeto notis pri tiu serio:

Preso:	ofseta	Nominaloj: 60, 110, 120 cendoj
Mezuro:	36x25 mm	Oficiala UTK kun unuataga stampo
Kvanto:	Nelimigita	Eldondato: 4a de februaro 1987

En la filatelejoj de la socialismaj landoj tiu serio ne estas aĉetebla. Eĉ en la aliaj landoj ŝajne estas problema la akiro. Tamen, mi pensas, ke post iom da tempo tiu serio estas havebla por niaj klubaj geamikoj.

Koran dankon al nia Anni Wester! Ankaú al Hans Jankowski, kiu sendis la gazet-informon.

Malto

Laú sciigo de John Vella-Bondin, sekretario de ESPERANTO SOCIETO MALTO, la malta E-poŝtmarko aperos la 18an de augusto 1987, ne, kiel anoncite antaúe la 10-an de junio. La prezo de tiu pm estos 8 maltaj cendoj, sufiĉe por sendi leteron al Europo.

GDR

La poŝtministerio nun levis la vualon antaú la E-pm. La gazeto DER MORGEN en sia filatela rubriko de 13a de junio informis, ke la pm-bloko aperos la 7-an de julio 1987. Eldonkvanto: 2,1 milionoj. Tio signifas, ke mi povos akiri en la poŝtejo nur tri pecojn pro la limigita eldonkvanto. Tamen, iom pli poste mi certe povos sendi al ĉiuj tiun blokon. La gazeto montris ankaú foton pri la bloko kaj pri la unuataga stampo, pli precize: pri la speciala stampo, ĉar ĝi funkcias tutan monaton en la poŝtejo BERLIN 1085.

Brazilo

Nia Gert Drucker informis, ke en Brazilo ne aperos jubilea E-pm. Tio okazas pro dekreto, kiu preskribas limigi aperigon de novaj pm al triono de la planita kvanto.

Ĉinio

En tiu lando aperos E-pm. Bedaúrinde mi perdis la daton. En nia sekvonta informilo do denove vi povos legi pri novaj E-pm.

Sovetunio

En julio aperos markokoverto kun surpresita E-pm, kiu montras portreton de Zamenhof.

Hungario

Ankaú en julio aperos tie E-poŝtkarto kun surpresita E-poŝtmarko. Pro redaktofino ne eblas doni pli konkretajn datojn.

Jubilea pm el Kubo

Nia LVL 71 jam donis al vi informojn pri ĝi, eĉ antaú ĝia apero. Dank'al la modela informado de nia kluba amiko Hektor Juarez Figueredo. Kaj dank'al li hodiaú mi povas peri al vi pliajn informojn pri ĝi. Laú la kuba pm-katalogo ĝi posedas la katalogan numeron 3463. Unu folio posedas 5x8 = 40 pecojn. Interesa fakto estas, ke en pluraj poŝtejoj de la kuba ĉefurbo ĝi estis vendata jam ekde la 9a de marto. Tio okazis i.a. en la poŝtaj zonoj 3 kaj 5 de Habana. Kaj sekve eblas trovi nian kuban E-pm jam kun datoj antaú la oficiala eldontago. Plene ni samopinias kun nia Figueredo, ke tiu poŝtmarko estas tre bela propagandilo por nia lingvo. Necesas ĉi-loke aldoni, ke aperis oficiala unuataga koverto kiun projektis ankaú la grafikisto Penate.

Mi ne dubas, ke tiun ĉi poŝtmarkon ĉiuj niaj klubaj geamikoj povas akiri, kontraúe al tiuj de Surinamo, ĉar kubajn poŝtmarkojn oni ja vendas ankaú en la filatelejoj de la socialismaj landoj.

Ni direktas koran dankon al Figueredo pro la multaj valoraj informoj lige kun la apero de tiu ĉi poŝtmarko!

Jubilea pm el Bulgario

La oficiala eldondato de tiu ĉi jubile-jara Esperanto-poŝtmarko estas la 12a de februaro, kvankam ĝi estis havebla nur semajnon poste. Laúdire. Dankon mi ŝuldas al Petar Todorov, Georgi Litov, Draguŝko Petrov kiuj informis pri la apero de tiu pm kaj al Ljuben Grozdanov, kiu pli detale informis pri la marko. Jen la ĝis nun akiritaj datoj:

Eldontago:	12a de februaro	Koloroj: flava, verda, nigra
Kvanto:	1 100 000 pecoj	Desegnisto: Donĉo Karapetrov
Nominalo:	13 stotinkoj	

Oficialan UTK mi ne vidis, sed mi posedas koverton, eldonitan de BEA jam pastintjare kun jubilea simbolo, kun unuataga ovala stampo, kaj ankaú la koverto-tutaĵon kun la Zamenhofa portreto (5-stotinka pm) stampita per la unuataga stampo.

Sur la poŝtmarko aperas bele farita portreto de Zamenhof kaj du tergloboj kun la jubilea simbolo. Bone farita! Gratulon ankaú al BEA, kiu ĝustatempe ekagis ĉe la poŝta ministerio por eldono de tiu ĉi bela marko.

Niaj poŝtstampoj

40 jaroj E-Societo Rijeka

De iú el niaj klubaj geamikoj mi ricevis tiun stampon, eĉ kopioj min atingis. Bedaúrinde mi ne plu scias, kiu sendis ĝin. Pardonu. Helpe de la UEA-libro mi trovis adreson de la delegito Skalamera, kaj pro lia modela laboro, li peris adreson de kompetentulo, ni nun detale povas fari notojn pri tiu stampo.

La stampo funkciis 11.04.1986 en la poŝtejo 51101 RIJEKA. Tie oni ĝin stampis en nigra. Krome la poŝto donis permeson surpresi la stampon en verda kaj ruĝa. La stampon prizorgis la filatela societo Rijeka kiu ankaú eldonis memor-koverton.

La stampo tekstas: 40 JAROJ DE ESPERANTO SOCIETO RIJEKA, montras esperanto-stelon kun la jarciferoj: 1946 kaj 1986 kaj la daton 11.04.1986.
Sube: 51101 RIJEKA.

La memor-koverto posedas la indikon: F.D. Rijeka br. 63/86. Tiun ĉi stampon eblas akiri en nia stampobanko.

Lingvo de arto kaj kulturo (GDR 31)

Mi estis gasto en t.n. ''Metiejaj kulturtagoj Halle'', 25.2–2.3.1987 aranĝo de E-junularo de GDR. Partoprenis 100 gejunuloj el GDR, Pollando, Hungario kaj Bulgario. Mia tasko estis prezenti nian esperantan filatelion. Plene min surprizis esperanta poŝtstampo kaj eĉ speciala poŝt-agentejo en la konferencejo. Nur ''lastminute'' la poŝto konsentis pri tiu stampo kaj tial neniu antaúe ion sciis. La stampo funkciis 26/27/29.2.1987 en la poŝta agentejo kaj poste en la poŝtejo. En la stampo aperas bildo pri la ''Händel-Domo'' kaj tekstas: LINGVO DE KULTURO KAJ ARTO 1987. Supre: HALLE 2/4020 kaj sub tio la dato. Iom stranga teksto en la stampo, oni jam devas scii, ke temas pri Esperanto. La aranĝo estis bone organizita, al la gejunuloj ĝi tre plaĉis.

HU 101

Niaj klubaj amikoj Vilmos Radnai kaj Stefano Fekete, kaj ankaú nia malofte aúdebla Frederiko Zöld, sendis esperantofilatelajn salutojn el la ''28a HUNGARLANDA ESPERANTO KONGRESO'', kiel tekstis tiu stampo. En la stampomezo: supre: E-stelo, sub ĝi ESPERANTO, kaj: jubilea emblemo/100 JARA/BUDAPESTO. Sube: BUDAPEST, 1987.III.20. Dankon al ĉiuj tri pro la bona informado.

La stampoj de Kubo

Eble mi iom tro rapidis en nia LVL 71, asertinte, ke la stampo de 16a de marto 1987 estas la *unua* poŝta E-stampo. Atingis min en februaro 1987 letero el la kuba urbo SAGUA LA GRANDE kaj ĝi estis stampita kun stampo kun Zamenhofa portreto. Mi ankoraú ne scias, ĉu ĝi estas Poŝta, eble jes, eble ne. Respondon mi ankoraú ne ricevis. Tial por mi estas hodiaú iom komplika afero, doni numerojn al la du stampoj lige kun la eldono de la kuba E-pm. Mi petas pardonon!

De nia kluba amiko Figueredo mi ricevis detalajn informojn pri la du kubaj stampoj lige kun la jubilea E-pm:

A 1:	La Habana 6	1987 16.03	100 jaroj Esperanto	pres. nigra 30
A 2:	La Habana 6	1987 16.03	100 jaroj Esperanto	manstamp. verd/griza 30
B:	La Habana 4	1987 16.03	100 jaroj Esperanto	ov. verda 57

A: Tiu oficiala unuataga stampo funkciis ĉe poŝtoficejo La Habana 6 (sidejo de la Kuba Ministerio pri Komunikado), Plaza de la Revolucion

A 1: Trovebla sur kovertoj venditaj en filatelejoj

A 2: Trovebla sur kovertoj enpoŝtigitaj de filatelistoj

Por uzo de tiu stampo A aperis oficiala UTK kun la jubilea simbolo kaj dulingva teksto: PRIMER DIA/UNUA TAGO/ Centjara Jubileo de Esperanto 1887–1987/ CENTENARIO DEL ESPERANTO

B: Memoriga stampo ĉe poŝtoficejo La Habana 4, Vedado, rajtigita de Poŝta kaj Telegrafa Direkcio.

Uzita dum nokta renkontiĝo ĉe la sidejo de Kuba Tutlanda Unuiĝo de Verkistoj kaj Artistoj (UNEAC). La renkontiĝon aranĝis Kuba Esperanto Asocio, Kuba Filatela Federacio, UNEAC kaj Kuba Instituto por Interpopola Amikeco (ICAP).

Por uzo de tiu stampo KEA eldonis specialan koverton kun reliefa preso.

La stampon kaj la koverton desegnis la grafikisto Penate. La mapo pri Kubo kun la E-stelo, kiu aperas en la stampoj kaj sur la kovertoj estas la emblemo de KEA.

Dankon al vi, sinjoro Figueredo, pro tiuj ĉi detalaj informoj! Espereble sekvontnumere jam mi definitive povas doni numerojn al niaj kubaj stampoj.

Atentu! A-1 = 2-1, A-2 = 2-2, B = KUBO 3. Legu sub KUBO 1 la kialon.

SVE 29

Per la poŝta komunikilo n-ro 7/87 le sveda poŝto informas, ke de la 10a ĝis la 13a de aprilo funkcias memoriga stampo en la poŝtejo 101 10 Stockholm okaze de la jubilea kongreso de la Sveda Esperanto Asocio en la parlamenta domo de Stokholmo. La bildo de la stampo montras plaĉe grafikitan jubilean simbolon. Kun ĉirkaŭa teksto:

10.4 STOCKHOLM 87/SVEDA ESPERANTO KONGRESO/
EN LA PARLAMENTA DOMO, kaj centre: ESPERANTO/100 JAROJ.

SVE 30

La 11an de aprilo 1987 funkciis en la Poŝta Muzeo en Stokholmo memoriga stampo okaze de la unua filatela Esperanto-ekspozicio en la muzeo. La stampon tre afable senkoste aperigis la Poŝto Muzeo al tiu unika evento, aranĝita en kunlaboro kun la Sveda Esperanto Federacio. Nia kluba amikino Anna-Greta Strönne tie montris imponan dokumentadan Esperanto-filatelan ekspozaĵon, kaj ni el tuta koro gratulas al ŝi.

La stampo montras la plaĉe aranĝitan jubilean simbolon kaj la tekston: POSTMUSEUM STOCKHOLM/FILATELA EKSPOZICIO, kaj: ESPERANTO 100 JAROJ.

Koran dankon al Anna-Greta Strönne, kiu sendis i.a. la oficialan poŝtan komunikilon al mi.

KUBO 1

Jam post redaktofino alvenis la konkreta sciigo: la stampo el SAGUA LA GRANDE, decembro 16 1986, estas poŝta! La ronda stampo supre havas la noton CUBA CORREOS. En la mezo estas portreto pri Zamenhof, ĉirkaúas ĝin la tekstoj: LAZAR LUDWIK ZAMENHOF/CREADOR DEL ESPERANTO/EXH FIL 127 ANIV NATALICIO, en la suba rondo: SAGUA LA GRANDE VC kaj sub ĝi: CLAUSURA DIC 16 1986 (KUBO 1-1) aú APERTURA DIC 16-1986 (KUBO 1-2). Do tiu stampo ekzistas en du variaĵoj. La stampon iniciatis la CIRCULO FILATELICO JOSE LUIS ROBAU.

Ĉinio 5

Nia amiko Song Shengtan ne fidis al siaj okuloj, ekvidinte en albumo de ĉina filatelisto dum la 2a kongreso de Jiangsu Filatela Asocio en majo 1987 nekonatan ĉinan stampon pri 71-a UK. Tiu ronda ruĝa stampo portas en tekston: La 71a Universala Kongreso de Esperanto kaj la daton: 1986.7.26. Krome: JIANGU kaj CHANGZHOU. En la mezo de la stampo terglobo kaj la konata Tian An Men-konstruaĵo. Nun nia amiko ege klopodas por akiri tiun stampon, ĉar nur malmultaj filatelistoj en la urbo Changzhou posedas ĝin. Ni gratulas al Song por la trovo de tiu ĉi stampo kaj deziras al li sukcesan serĉadon!

GDR 33

Mi kuraĝas noti al aperon de GDR 33, kvankam en la nuna momento ĝia apero okazos nur post unu monato. Sed mi fidas al la gazeto DER MORGEN. La ronda stampo supre portas: BERLIN 1085 kaj sub ĝi la kvinpinta E-stelo kaj la teksto: 100 JAHRE ESPERANTO/100-jara jubileo de Esperanto. La unua tago de ĝia uzado estas la 7a de julio 1987. Temas pri oficiala unuataga stampo okaze de eldono de la jubilea pm-bloko.

Surinamo 1 (SUR 1)

Dank'al nia Annie Wester ni eksciis pri tiu ĉi stampo. Temas pri unuataga stampo kun la portreto de Zamenhof kaj la teksto: PARAMARIBO 4 FEBRUARI 1987/EERSTE DAG VAN UITGIFTE (Unua tago de eldono). La stampo estas trovebla nur sur unuataga koverto. La UTK montras foton kun aútografo de Zamenhof, dekstre de ĝi: 100 jaar Esperanto, kaj sub ĝi: SURINAME. Bedaúrinde la kvalito de la stampo preskaú ĉiam estas malbona. Mezuro: 30 mm. Tre koran dankon al Annie Wester (pron. Ani Vester).

Nederlando 18

Pri tiuj stampoj informis niaj Annie Wester kaj J. Kuijpers, koran dankon al ambaú! Temas pri maŝin-varbstampoj, uzataj dum aprilo 1987.

La teksto en la tekstoparto: ESPERANTO/100 JAAR/INTERNATIONALE TAAL Amsterdam havos numeron NE 18-1, Utrecht NE 18-2, Rotterdam NE 18-3, Hago NE 18-4. Konkretajn datojn de la uzado mi ankoraú ne ricevis.

Hispanio 27

Post la Vigo-stampo de 1986 nun sekvis la jubile-jara maŝinstampo de Madrid. Bedaúrinde la stampo-maŝino malbone funkcias, tial la kvalito ĝenerale estas fuŝa. Kial la mendinto ne protestas? Oni certe pagis sufiĉe da mono al la poŝto. Sed tio okazas. La teksto de la bone grafikita tekstoparto: CIEN ANOS DE ESPERANTO/COMO LENGUA/INTERNACIONAL/CENTJARIĜO/DE ESPERANTO/KIEL INTERNACIA LINGVO/ Krome en la tp pozas la jubilea simbolo. Dekstre la ronda ds de MADRID kun la dato 20.4.87. Koran dankon al nia amiko Cervello, kiu sendis la stampon.

Italio 41

Denove ni eksciis pri IPA-stampo kun la esperanta teksto: SERVO PER AMIKECO. Oni uzis ĝin unuan de februaro en la itala ASIAGO (VI). Krom la IPA-emblemo ĝi portas la italan tekston: 2. TROFEO INT LE SCI FONDO.

Afrankstampo 36

Jam en LVL 68 mi notis iom pri ĝi. Nia kluba amiko Pignatelli klopodis pro ĝi, senrezulte. Sed post trarigardo de la telefona libro de Roma, la eksciis, ke NALCO estas firmao, kiu pritraktas industriajn akvojn. Kaj li konstatis, ke en la sama domo estas pluraj aliaj firmaoj. Kaj tiel li trovis . . .

Afrankstampo 37

Tiu AF posedas sub la pm la numeron FP 400E 2357. Meze la ds kaj maldekstre la tekstoparto (fp):

A.N.P.A.C.
Viale dell'Esperanto, 71

ANPAC estas mallongigo por "Associazione Piloti Aviazione Civile": Asocio Nacia de Civil-Aviadistoj. Nia amiko Pignatelli supozas, ke inter la multaj firmaoj, kiuj havas sian sidejon en la multaj domoj de tiu ĉi strato, estas aliaj kun afrankstampoj. Koran dankon al nia kluba amiko, kiu sendis fotokopion pri ĝi.

AF 18-2

AF 18 mi posedis nur 1 ekzempleron, el la jaro 1980. Dum IFER samideano doktoro Werner Bormann el Hamburg donacis al mi duan ekzempleron. Hejme mi rigardis ĝin kaj kun surprizo konstatis, ke ĝi posedas ds de ARHUS V anstataú de ARHUS C.

Eble iu el ni malkovros, de kiam tiu nova ds funkcias. Mia posedas la daton – 3.2.87.

BU 17

El la poŝtejo 1000 Sofia ĝi venas, estas ovala kaj montras nian jubilean emblemon. Sube la dato: 12.02.1987. Sed, atingis min du leteroj kun tiu stampo nur la 20an de marto. Kaj unu el ambaú posedas duan, ondolinian maŝinstampon, kun la dato: 13.3.87! La alia koverto posedas la ovalan E-stampon sur la E-pm, kaj normalan datstampon de SOFIJA A-C 1000, ankaú kun la dato 12.2.87. Iom mistera la tuto. Kiel aliloke skribita, 24a de februaro estis je dispono nur la nova E-pm, sed nek speciala stampo nek UTK.

Dankon al amiko Litov kaj al amiko Grozdanov pro la stampoj.

Tutaĵoj

E-pk GDR 50-1/2

Okaze de la "Tago de la Esperanto-libro 1986" aperis surpresitaj poŝtkartoj kun la portreto de Henri Barbusse kaj kun la eldiro: "Esperanto estas batalilo de paco, la ABC de internaciismo". Eldonkvanto: 10 pfenigoj: 3 000 pecoj, 25 pfenigoj: 250 pecoj.

E-pk GDR 51

Okaze de junulara Esperanto-renkontiĝo en Halle aperis surpresita poŝtkarto, nominalo 10 pfenigoj, kun grafikaĵo pri Zamenhof kaj la tekstoj:

METIEJAJ KULTURTAGOJ HALLE/25.02–02.03.87/grafikaĵo/
1887 1987/100 Jahre Esperanto/Werkstatt-Tage der Kultur

La iniciatintoj de tiu poŝtkarto uzis la grafikaĵon pri Zamenhof, kiun antaŭ jardekoj faris nia kluba amiko Bartoŝik.
Eldonkvanto: 5 000 ekzempleroj.

E-pk GDR 52-1/2

Lige kun la jubilea stampo 100 jaroj Esperanto de IFER 87 aperis komence de marto 1987 tiu ĉi surpresita poŝtkarto. La surpreso montras bildon pri Zamenhof kaj la tekston: Cent jaroj/de Esperanto/Lingvo de/interpopola/kompreniĝo.
Eldonkvanto: 3 000 kaj 300 pecoj (10 kaj 25 pfenigoj).

Koverto kun surpresita E-pm el Aŭstralio

Okaze de la 21a IPA-konferenco la aŭstralia poŝto aperigis memorigan poŝtkoverton, nominalo 36 cendoj, kun surpresita esperantlingva poŝtmarko (SERVO PER AMIKECO). Eldontago estis la 7a de oktobro 1986. Dankon al Werner Heimlich pro tiu ĉi sciigo.

I P A = INTERNATIONAL POLICE ASSOCIATION

Bulgaraj markokovertoj

Ofte atingis nin demandoj de niaj klubaj geamikoj, ĉu la bulgaraj Esperanto-tutaĵoj estas oficialaj, aŭ ĉu private eldonitaj. Unuafoje nun okazis, ke nova kluba amiko, bulgaro, skribis pri tio al mi. Li citis el "Katalogo-Informlibro pri bulgaraj tutaĵoj 1879–1979" la jenajn notojn:

1978	14a de julio:	63a Universala Esperanto Kongreso Varna 1978 Koverto n-ro 1499 (sur kov. 1279) 2 stotinkoj Pentristo: Todor Momĉilov, Kvanto: 5 000 pecoj.
1978	16a de julio:	34a Internacia Junulara Kongreso 1978 Tirnovo Koverto n-ro 1500 (sur kov. 1279) 2 stotinkoj Pentristo: Stefano Kanĉev, Kvanto: 10 000 pecoj.
1978	28a de julio:	10a jubilea ĉefkunveno de IPTEA, Varna, 1978 Koverto n-ro 1501 (sur kov. 1279) 2 stotinkoj Pentristo: Todor Momĉilov, Kvanto: 10 000 pecoj.

Mi ne dubas pri tio, ke pri la ceteraj bulgaraj E-tutaĵoj troviĝas notoj en la bulgara filatela gazeto. Pri la 1985 eldonita tutaĵo ni jam ricevis informojn, sed mankas informoj pri la tutaĵoj de la 40a BEA-kongreso kaj pri la Vraca-tutaĵo. Al la klubo en Vraca mi skribis: oni ne respondis.

Jubilea koverto el Bulgario

La 25an de februaro 1987 Petar Todorov sciigis al mi la aperon de tiu ĉi koverto kaj en marto mi ricevis ĝin de nia kluba amiko Litov. La koverto kun la 5-stotinka poŝtmarko posedas vertikale ovalan surpresaĵon kun portreto pri Zamenhof kaj kun la teksto:

100 JAROJ ESPERANTO/
DR L L ZAMENHOF AUTORO DE LA LINGVO ESPERANTO

Ekspozicio en la Poŝta Muzeo de Stokholmo

Koran gratulon al nia Anna-Greta Strönne pro ŝi sukcesa esperanto-filatela ekspozicio, kiu okazis de la 10a ĝis la 12a de aprilo 1987. Mi surbendigis elsendaĵon el Radio Polonia, kiu abunde informis pri tiu ekspozicio. Ankaú Ivar Paulsson kaj Kurt Lindström informis pri ĝi. Laú artikolo en la sveda E-gazeto "La Espero", verkita de I. Nordin, la ekspozicio enhavis ne nur poŝtmarkojn kaj poŝtstampojn okaze de E-aranĝoj sed ankaú objektojn, montrante famajn esperantistojn, al Esperanto favorajn famulojn kaj iliajn verkojn ktp, kaj tiamaniere donis interesan bildon de Esperanto en la kulturo kaj en la mondo.

La ekspozicion vizitis multaj homoj, inter ili ankaú multaj kongresanoj de la samdate okazinta sveda E-kongreso. – En inda maniero nia Anna-Greta Strönne kontribuis al la jubile-jaraj aranĝoj. Dankon al vi pro bone farita laboro!

Honorinsigno al Fekete

Pro efika nacia kaj internacia popularigo de la Esperanto movado per filatelaj rimedoj nia kluba amiko Fekete la 21an de marto ricevis de la prezidio de la Hungara Esperanto Asocio la honorinsignon de HEA. Kun li ricevis ĝin 4 aliaj gesamideanoj, i.a. d-rino Flora Szabo-Fe!sö, ĝenerala sekretario de UEA. Koran gratulon al vi.

Fekete-ekspozicioj

Okaze de JER en Gödöllö nia kluba amiko aranĝis en la kulturdomo de Gödöllö E-filatelan ekspozicion la 30an de marto ĝis 6a de aprilo 1987. Krome li partoprenis per ekspozaĵo en ekspo de la franca urbeto Aubagne inter 15a ĝis 30a de majo sub la titolo: "Hungara-franca Esperanto Interrilatoj".

Ni admiras la aktivecon de nia amiko Fekete. Gratulon!

Ora por Mikulski

En marto 1987 okazis en Essen/FRG filatela ekspo "FRG/Pollando", nia amiko por sia e-filatela ekspozaĵo ricevis orumitan medalon. Ni kore gratulas!



Aliaj pri ni

Radio Polonia: "Parolas Varsovio"

En la unua kvaronjaro de nia jubilea jaro tiu radiostacio almenaú 5-foje en sia rubriko "Esperanto-ekspreso" raportis pri ELF/AREK kaj pri aktualaj esperantaj filatelaĵoj. Rekomendindas, pli ofte aúskulti tiun stacion. Mi ankaú utiligis tiun stacion, por peri salutojn al pluraj de niaj klubaj geamikoj.

Petu la program-informilon de la adreso: RADIO POLONIA/ESPERANTO, PL 00-950 Varsovio, Pollando.

La Mondo

En la decembra numero ne aperis la lastinformile raportita artikolo, tamen en ĝi du artikoloj pri nia ELF-AREK-kunveno en la pekina UK kaj pri la ĉina E-tutaĵo. Gratulon al Ĉin Kajĝi, kiu prizorgis la aferon.

Al nia kluba amiko Song Shengtan meritas sendi gratulon pro la artikolo en la numero 2/87 pri ni. Pli ol 4 paĝoj ampleksas tiu artikolo, en la ĉina kaj en Esperanto.

La Philatelie Francaise

En decembro 86 kaj en februaro 87 tiu filatela gazeto denove enhavis esperanto-filatelajn paĝojn el la plumo de nia estimata amiko Amouroux. Decembre pri la ĉina E-movado kaj februare pri zamenhofaj filatelaĵoj.

Lelystad-Courier

Grandega foto pri nia Dick Goslinga kun esperantaj filatelaĵoj en la mano pompas titolpaĝe de tiu urba gazeto. La akompana teksto pri "Esperanto festas la centjaran ekziston". Dankon al Goslinga pro sendita kopio!

Arbetet kaj Göteborgs-Posten (amaú svedaj)

"Esperanto-movado sur 100-jaroj-markoj" (Arbetet, 2.2.1987) kaj "Poŝtstampoj kun teksto en Esperanto" (Göteborgs-Posten, 29.3.1987), estas la titoloj de grandaj artikoloj en tiuj ĉi svedaj gazetoj. La redaktoroj skribas pri la esperanto-filatela agado de Anna-Greta Strönne kaj pri ŝia ekspozicio, kaj ili ambaú informas pri jubile-jaraj poŝtmarkoj kaj montras bildojn de la kuba resp. la bulgara E-pm.










世界语诞生一百周年
1887 - 1987
ESPERANTO
8分
中国人民邮政
J 139.(1-1)
1987


CUBA 1987 30
CORREOS-POSTO
AŬTORO DE ESPERANTO
ESPERANTO
CENTENARIO DEL ESPERANTO


100LAT
JĘZYKA ESPERANTO
POLSKA 45zł


100 JAAR ESPERANTO 100 JAAR ESPERANTO


SURINAME 110c


SURINAME
120c
ESPERANTO

Niaj Esperanto-glumarkoj

100 jaroj de Esperanto

kaj: 72a Universala kongreso de Esperanto, Varsovio, 1987, tekstas tiu ĉi serio. Eldonita: januaro 1987. Eldonis: J. Cervello. Desegnis V. Radnai.

Eldono en 15 kolorvariaĵoj. En unu folio 4 diversaj glm.
– kolono kun monumento pri?
– monumento pri Koperniko
– monumento pri Chopin (?)
– monumento pri la urba blazono (virino kun glavo)
Eldonkvanto: po koloro cent folioj.

Vizitu Ĉeĥoslovakion

Eldonita en februaro 1987. Eldonis: J. Cervello. Eldono en 12 kolorvariaĵoj. En unu folio 6 diversaj glumarkoj pri: Karlŝtejn, Kutna Hora, Praha-Pulvora turo, Praha-Katedralo, Hluboka, Bouzov. En ĉiu glm verda stelo kun inicialoj J.C.

Malnovaj IDO-glumarkoj

Hans Jankowski trovis plurajn malnovajn IDO-glumarkojn el la 30aj jaroj. Aperigis tiujn la firmao TOBLER. Dankon al li pro senditaj perfektaj kseroksaĵoj pri la glm, kiuj portas n-rojn: 217, 233, 322, 393, 397. Estis plezuro por mi konstati, ke en la nuna Esperanto akceptiĝis jam pluraj tiamaj IDO-vortoj. Hodiaú en la mondo ankoraú ekzistas manpleno da Idistoj, pli bone dirite: IDO-sciantoj. Plej ofte temas pri Esperantistoj.

Vizitu Hungarion (II)

Eldonita en januaro 1987 de J. Cervello. Designis V. Radnai. Eldono en 4 kolorvariaĵoj kun po 100 folioj. 1 folio posedas 7 div. nedatumitajn glumarkojn kun vidindaĵoj el Miskolc, Eger, Budapest, Hodmezövasarhely, Gyula, Sopron kaj unu kun hungara mapo.

Jubilea emblemo

kofro-etikedo eldonita de GEA en Bad Hersfeld kun la jubilea emblemo kaj la enskribo: Esperanto die internationale Sprache-1887-1987. Memglua. Dankon pro informoj al R. Hirsch.

Jubilea emblemo

memglua glm eldonita de GEA en Bad Hersfeld. Sama desegnaĵo kiel la kofro-etikedo, sed sen indikoj pri GEA. En folio estas 3x3 glm. Dankon al R. Hirsch.

E-stelo

granda ronda kofro-etikeda memglua glm kun la verda stelo, nigra enskribaĵo "internacia lingvo" kaj nigra ESPERANTO, en iel kunplektita maniero.

23a Kataluna Kongreso de Esperanto

Eldonita en februaro 1987, eldonis: Cervello. Eldono en 9 kolorvariaĵoj. En unu folio kvar diversaj glm. Krom la supre citita teksto: BARCELONA 1987. Eldonkvanto: po cent folioj.

72a Universala Kongreso

Eldonita en marto 1987 de J. Cervello. La folio posedas 6 div. diversmezurajn glm'n. Eldonkvanto: 400 folioj. Designis: Radnai Vilmos. La 6 glm estas strie perforitaj tiel, ke po tri estas en unu glm kunigitaj. Koloroj: ruĝa, verda kaj nigra.
Koran dankon al nia kluba amiko Cervello pro la sciigoj.

72a Universala Kongreso

Eldonita en majo 1987 de J. Cervello. Folio posedas 4 div. glm. Eldonkvanto: 100 folioj po koloro. 8 variaĵoj. Desegnis: V. Radnai. Unu glm kun erara teksto:
00 JAROJ DE ESPERANTO.
Dankon al J. Cervello, kiu sciigis pri la glm-folio.

Esperanto Lingvo de Paco

Glm-folio kun 4 samtekstaj glm kaj supre maldekstre glm "Kion vi faras por eviti tion". 12 variaĵoj lau koloro. Eldonitaj en marto 1987 de J. Cervello. Po cent folioj.

Esperanto Lingvo de Paco

Glm-folio kun 8 grandaj glm "NE PLU MILITOJN". Entute 8 variaĵoj lau koloro. Eldonitaj en aprilo 1987 de J. Cervello, Terrassa. Po cent folioj.

23a Kataluna Kongreso de Esperanto

Glm-folio kun 4 diversaj larĝaj glm "BARCELONA atendas vin 1987". 9 variaĵoj lau koloro. Eldonitaj en aprilo 1987. Serio "C 1". Po cent folioj.

Naturamikaj Esperantistoj

Memglua glm kun verda stelo, terglobo, manoj kaj la teksto: ESPERANTO 1887–1987. Detaloj ne konataj.

Katolikoj Preĝas

kaj agas por paco kun Pollando, kaj: VOJO VERO VIVO PACO tekstas memglua ronda glm, kiun disponigis al mi Rolf Beau el Leipzig.

61a SAT Kongreso en Brazilio 1988

Bela plurkolora glm kun SAT-emblemo kaj blazono de CAMPOS DO JORDAO. Memglua. Detaloj ne konataj. Sendis: Paulsson.

60a SAT-Kongreso

22–29.8.1987 Centjariĝo de Esperanto, Bulonjo ĉe maro. blanka-verda kun nigra turo. 1 folio posedas 25 glm'jn.

42a Kongreso de SAT-Amikaro

18.19.20.21 aprilo 1987, Vaison la Romaine, Espranto 1887–1987. En la glm vazo kun ornamaĵoj. Koloro nekonata. (Verda?) 1 folio posedas 4x4 glm = 16 pecoj. Aperis ankaú kofro-etiketo. Koran dankon al nia Kurt Lindström, kiu sendis folio-kopion.

72a UK

Triangulaj flagosimilaj glm en blanka kaj en arĝenta kun verda stelo k teksto: 72a Universala kongreso de Esperanto, Varsovio, 1987, 07.25–08.01 (Eldonis: V. Radnai).

100 jaroj de Esperanto

kun portreto pri Zamenhof, verda kaj ruĝa. Nedentumitaj glm eldonitaj de V. Radnai.
Li krome eldonis la jenajn glm:
- ronda kofroetikedo kun E-stelo k teksto ESPERANTO L.I.
- ronda glm E-Klubo Leipzig (des. J. Schulze)
- fantaziformaj glm "100 jaroj de E 1887–1987"

Koran dankon al V. Radnai, kiu sendis specimenojn.

Vin-etikedo

ESPERANTO – Vino de Cassis, Cote d'Azur, multkolora.

100 Jahre Esperanto

terglobo kun la jubilea emblemo, verda, ronda, eldonita en AU, en folio 3x3 memgluaj glm, dankon al nia R. Hirsch.

Sveda Jarkongreso 1987

parlamenta domo en Stockholm, supre: ESPERANTO 100 JAROJ, nigra/verda, gumitaj, en folio 4x2 glm, dankon al nia I. Paulsson.

100 Jahre internationale Sprache

ESPERANTO, Deutscher Esperanto-Bund, kofro-etikedo memglua, verda/nigra, eldonita 1987. Dankon al R. Hirsch.



E-pm-bloko de GDR

Eldontago:	7a de julio 1987
Valoro:	85 pfenigoj
Dentumo:	14
Mezuro:	27,5 x 32,8 mm (marko) 57 x 83 mm (bloko)
Preso:	Ofseto
Grafikisto:	Ekkehart Haller
Kvanto:	2 100 000

La poŝtmarko havas la LIPSIA-katalogo-numeron 2892, la bloko estas la 82a eldonita en GDR.
La valoro de 85 pfenigoj respondas al la poŝta tarifo por ekspedo de registrita letero eksterlanden (35 + 50 pfenigoj).
Informoj laú notoj en "sammler express" 11/87 (GDR).

E-pm de Pollando

Eldontago:	25a de julio 1987
Valoro:	45 zlotoj
Dentumo:	mankas notoj
Mezuro:	43 x 31,25 mm
Preso:	Ofseto
Grafikisto:	Andrzej Szczepaniak
Kvanto:	2 000 000

Informoj laú notoj en "Filatelista" (Pollando).

